



**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 16/77 - 18 aprilo 1977  
Aperas ĉiusemajne



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pichel  
Postfach 2113 1  
D-85 Nürnberg  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977

Salutvorto de ĉefministro de Nordrejn-Vestfaliao

Paderborn (pp) - Heinz Kühn, la ĉefministro de la federacia lando Nordrejn-Vestfaliao, dediĉis al la Eŭropa Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 27-a ĝis la 31-a de majo 1977 en Paderborn, salutvorton, kies Esperanto-tradukon ni publikigas ĉi-sekve:

La Eŭropa Esperanto-Kongreso okazas ĉi-jare je mia ĝojo en Nordrejn-Vestfaliao. Certe ne hazarde estis elektita Paderborn, la plej juna grandurbo de nia lando, kiu en ĉi tiu jaro festas la 1 200-an datrevenon de sia ekzisto.

En la historia evoluo de Paderborn estas multaj signoj de limtranspaŝa kunlaboro de la popoloj kaj ne laste la multjaraj ĝemeliĝaj rilatoj kun urboj en Francio kaj Anglio eble persvadis vin okazigi la kongreson en Paderborn.

Jam en mia salutvorto okaze de la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1976 en Eindhoven mi elstarigis la nekontesteblan signifon de via organizaĵo por la popolinterkompreniĝo.

Eble okaze de via ĉi-jara kunveno politika aspekto trovu specialan atenton. Ĉiam ankoraŭ la politikistoj de la eŭropaj ŝtatoj parolas pri ne nur ekonomia, sed ankaŭ politika unuiĝo, kvankam la realeco ofte aspektas alie. Propraj intereso kaj pedanta kverelo ŝajnas ofte malproksimigi la komunecon. Konsideru kiel vian taskon fari praktikan kaj per tio ankaŭ politikan laboron sur la kampo de lingva kompreniĝo inter la eŭropaj ŝtatoj.

Tiel vi sukcesos ankri vian ideon ankoraŭ pli firme en la konscio de la homoj.

Mi deziras al la amikoj de Esperanto bonan restadon en ĉi tiu lando kaj multe da sukceso en la organizo de la kongreso.

sign. Heinz Kühn

ĉefministro de

la lando Nordrejn-Vestfaliao

La germanlingva originala teksto de la salutvorto estas publikigita en la germanlingva eldono de PP "Esperanto-Nachrichten-Dienst", n-ro 7/77.

## Informoj de la LLK en Paderborn

Faderborn (pp) - La Loka Kongresa Komitato de Eŭropa Esperanto-Kongreso informas:

Grava estas por la germanaj esperantistoj la ĉi-jara kongreso en Paderborn, ĉar dum la jarĉefkunveno de GEA nova prezidanto por Germana Esperanto-Asocio estos elektenda. Kiu gvidos la asocion dum la venonataj jaroj, kiun dum la lastaj 10 jaroj lerte prezidis d-ro Werner Bormann?

Pri multaj novaj ideoj oni aŭdos en Paderborn - kaj la esperantistoj devos prijuĝi ilin. Krom la alogaj amuzaj programeroj, pri kiuj ni jam informis, multaj kunsidoj nun estas antaŭvidataj, parte de konataj Esperanto-unuiĝoj, parte de la nova Eŭropa KLUBO.

Pri la kunsidoj ankaŭ informos la sciigoj nun forsendotaj kune kun la konfirmiloj pri aliĝo. Jam aliĝis gesamideanoj el Nederlando, Federacia Respubliko Germanujo, Belgujo, Svedio, Aŭstrio, GDR, Francujo, Kanado kaj Usono.

Adreso de la LKK: Eŭropa Esperanto Kongreso, Falkenweg 10, D-4790 Paderborn.

### GEA ne alloga por junaj homoj?

#### Cirkulera alvoko de GEA-estranano

Burgsteinfurt (pp) - En cirkulero de la 8.4.77 Helmut Klünder, GEA-estranano por junularaj aferoj, turnas sin "al ĉiuj lokaj grupoj kaj elektitaj membroj de GEA kaj GEJ" kun alvoko partopreni la kongreson en Paderborn, por tie diskuti "novan iniciaton" por "refortigi GEA-on".

En la cirkulero Helmut Klünder i.a. skribas: "Pro sepjara estraraneco en GEJ mi havis multajn eblojn spertiĝi pri la problemoj de la organizita Esperanto-movado. GEJ precipe dum la pasintaj 4 jaroj forte evoluiĝis - la financa fundamento estas solida, la nombro de ĉiujaraj aranĝoj estas konsiderinda kaj la aktiveco grandega.....

Se tiom pozitive estus la ĝenerala evoluo de la organizita Esperanto-movado en Germanio, ni povus esti kontentaj kaj ne necesus tiu letero. Sed bedaŭrinde la evoluo de GEA ne estis simila al tiu de GEJ dum la pasintaj jaroj.

Kun bedaŭro mi devis konstati, ke multaj junuloj, kiuj laŭaĝe elkreskas el GEJ, ne transiras al GEA aŭ nur dum mallonga tempo restas tie pasivaj membroj. Mi parolis kun multaj junuloj de tiu aĝgrupo, kaj montriĝis, ke ili ne transiros al GEA, ĉar ili ne povas identiĝi kun tiu asocio. Pli konkrete dirite: la por ili videbla laboro de GEA ne logas ilin kontraste al tiu de GEJ, kie ili ricevas oferton da diversaj aranĝoj kaj servoj.

En GEA junulo ne trovas, kion li konas de GEJ: renkontiĝojn por komencantoj, renkontiĝojn kun feria karaktero, kunvenojn por "ĝisostaj verduloj kaj laboremuloj" kaj renkontiĝojn, kiuj ne okupiĝas pri Esperanto, sed pri aliaj temoj per Esperanto.....

Por ne perdi la de GEJ por nia laboro varbitajn junulojn, mi nur vidas la eblon, ke GEA devas simile al GEJ priservi siajn membrojn. Mi neniel volas ŝanĝi la tradicion de la kongresoj - kvankam ankaŭ tie modifoj ne povus malutili - ĉar ili kontentigas certan grupon de GEA-membroj, kaj se ni esence modifus la kongresojn, ni perdus tiun grupon, kio kompreneble ne povas esti nia celo.....

Mi alvokas ĉiujn inter vi, kiuj interesiĝas pri tiu "nova iniciato" partopreni la kongreson de GEA okazonta pentekoste en Paderborn. Nur tie ni havos la ŝancon en granda rondo pridiskuti la problemon

(daŭrigo sur p.3.)

kaj post zorga pripensado trovi utilan koncepton, kiun sekvontjare ni povos realigi komune.

Ĉiukaze mi petas tiujn inter vi, kiuj pretas aktive kunlabori, kaj ne nur havas bonajn ideojn, skribe informi min pri ilia intereso kaj preteco partopreni la kongreson en Paderborn, por ke mi povas enprogramigi tian kunsidon kaj antaŭmendi konvenan salomon. Kompreneble aliaj proponoj viaflanke estas bonvenaj."

Adreso: Helmut Klünder, Schützenstr. 13, 4430 Burgsteinfurt.

### Die Welt des Dr. Esperanto

Wien (pp) - La aŭstra ĵurnalo "KURIER" en sia eldono de la 10-a de aprilo 1977 publikigis tutpaĝan artikolon pri Esperanto kaj Zamenhof sub la titolo "Die Welt des Dr. Esperanto" (La mondo de d-ro Esperanto) kaj subtitoloj "Antaŭ 60 jaroj mortis Zamenhof. Lia nova lingvo tamen vivas. Malgraŭ ĉio". La priskriba kaj analiza artikolo - cetere tre pozitiva - el la plumo de Ekhard Mahovsky estas ilustrita per 4 fotoj.

Laŭ nia scio la aŭstra gazetaro ĝenerale malmulte interesiĝas pri Esperanto kaj ĝia movado, des pli rimarkinda estas tiu artikolo en la konata ĵurnalo.

### Entreprene Homo

Lahnstein (pp) - Nuntempe oni multe parolas pri homaj rajtoj, sed tiuj elpaŝoj ĉefe celas propagandan efikon en la granda politiko. Por la realigo de homaj rajtoj oni devas labori, paciencie kaj ofte silente. Kaj unu el tiuj paciencaj, senbruaĵ laborantoj por la homaj rajtoj certe estas Richard Ott, patro kaj gimnazia instruisto de la Johannes-gimnazio en Lahnstein, F R Germanio. Por li estas korafero helpi al mizeraj malsanuloj, la lepruloj, kiuj ankaŭ havas rajton esti homo kaj kiuj bezonas nian helpon. Por povi helpi li mobilizis la helpajn fortojn de junaj homoj en la gimnazio kaj realigis ideojn por helpo. En la ĵus aperinta broŝuro "Unternehmen Mensch" (Entreprene Homo) Richard Ott skribas pri la mizero kaj malespero de lepruloj kaj la vojoj por helpi ilin. Sur paĝoj 34 kaj 35 la aŭtoro ankaŭ skribas pri la glumarkoj "Helpu al la lepruloj", kiujn sisteme iniciatis d-ro J. Kondor, kaj kiuj ankaŭ vendiĝas en Esperantujo. Estus dezirinde, ke esperantistoj ankaŭ estonte aĉetu tiujn glumarkojn. Cetere en la broŝuro ankaŭ legiĝas, ke radio-stacioj kun Esperanto-programoj propagandas ĉi tiun glumarkon.

### Aktivecoj de la Universitata Esperanto-grupo

Münster (pp) - Por la preparo de la Eŭropa Kongreso de la Kolping-Socio prelegis la 26-an de marto Dr. Otto von Habsburg, estro de la Pan-Europa-Union, en Münsterland-halo de Münster. Membroj de universitata Esperanto-grupo disdonis 500 varbfoliojn "5 vor 12 für Europa", varbilo de GEA.

Münster (pp) - Post granda varbkampanjo la universitata Esperanto-grupo de Münster organizis la unuan Esperanto-kurson en la lingvolaboratorio de la universitato dum la du antaŭpaskaj semajnoj. Venis 20 perecnoj, inter ili 3 geindonezianoj kaj 1 kanadino. 14 el la komencintoj finis la intensan kurson sukcese kaj dankis al la kursestro Gradi-mir Svilokos per donca libro. La sekvanta kurso komenciĝos fine de aprilo en la kadro de la oficiala programo de la universitata grupo, en kiu nun laboroas ĉ. 30 studentoj kaj asistantoj.

\*\*\*\*\*

Pilo-Press, internacia informservo ĉiusemajna, jara abonprezo 30,- GM  
Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,  
F&k. Nürnberg 819 56-851

Urbestro malfermas Esperanto-ekspozicion

Schwabmünchen (pp) - Sabate, la 23-an de aprilo 1977, je la 10-a horo, Urbestro de Schwabmünchen, FRANZ STAPPER, malfermos la Esperanto-ekspozicion en la elementa lernejo de Schwabmünchen. La ekspozicion organizas la Diskrikta Popolaltlernejo Augsburg, la Bavara Esperanto-Ligo kaj Germana Esperanto-Instituto.

Kadre de la ekspozicio, kiu estos malfermata sabate, la 23-an kaj dimanĉe, la 24-an de aprilo, de la 10-a ĝis la 18-a horo ĉiutage, okazos provlecionoj.

Kiel ni jam informis samtempe okazos la kunveno de Bavara Esperanto-Ligo kaj dimanĉe, la 24-an de aprilo, je la 10,30 horo seminario de GEI sub la gvido de Gerald Tucker "Metodiko de la Esperanto-instruado".

Schwabmünchen situas 25 km sude de Augsburg ĉe la Fervoja linio Augsburg-Buchloe.

Sukcesa kvizo pri Esperanto en la pola gazetaro

Varsovio (pp) - Pola Esperanto-Asocio kun helpo de la pola gazetaro nun organizas en la tuta lando kvizon pri Esperanto. Apude estas reproduktita la eltranĉaĵo el la konata Varsovia gazeto "Życie Warszawy" (Varsovia Vivo) kun la teksto de la kvizo, kiu ankaŭ aperis en multaj aliaj gazetoj kaj semajnevuoĵ. Kiel sciigas la Informa Servo de PEA, la interesiĝo estas grandega. Denove montriĝas ke kvizoj kaj konkursoj povas bone servi al la informado pri Esperanto.

La demandoj de la kvizo estas ege simplaj, sed por trovi la respondon oni devas serĉi en enciklopedio kaj tiam oni ekscias aliajn aferojn pri Esperanto.

Cetere ĉiuj kviz-partoprenantoj ricevos leteron kun dank-esprimo pro la partopreno kaj kun informoj pri PEA, UEA, lernolibroj, literaturo kaj ebloj lerni la lingvon.

La demandoj:

- 1) La unua lernolibro de Esperanto aperis en la jaro: a) 1859 b) 1887 c) 1917 ?
- 2) La kreinto de la lingvo Esperanto estas: a) Boudouin de Courtenay b) Otto Jespersen c) Ludwik Zamenhof ?
- 3) Kiu el la menciitaj verkoj de la pola klasika literaturo estis tradukita en Esperanton: a) "La pupo" de B. Prus b) "Sinjoro Tadeo" de A. Mickiewicz c) "La inundo" de H. Sienkiewicz?

La ĉefpremio estas senpaga feriado en Mielno plus diskaj kaj libroj.

\*\*\*\*\*

TRIXINI FURORAS!

TRIXINI furoras en Luksemburgo, li furoris en Ateno kaj en kelkaj urboj de FR Germanujo, li furoras tra gazetoj kaj revuoj divers-tipaj!

TRIXINI furoros en Paderborn okaze de la Eŭropa Esperanto-Kongreso!

Kiu estas TRIXINI ? Legu en la venonta numero de Pilo-Press kaj de Eŭropa Esperanto-Revuo!

Główna nagroda: wczasy w Mielnie

**Quiz dla wszystkich**

Z okazji 30-lecia kursów korespondencyjnych języka esperanto Zarząd Główny Polskiego Związku Esperantystów organizuje „quiz dla wszystkich”. Główna nagroda: tygodniowe wczasy w Mielnie (w luksusowym ośrodku wczasowym) wraz z pokryciem kosztów przejazdu (w programie wczasów m. in.: wycieczki, teatr, spotkania z ciekawymi ludźmi). Ponadto organizatorzy rozlosują wśród uczestników quizu kilkadziesiąt płyt, albumów i książek.

Aby wziąć udział w quizie należy odpowiedzieć przynajmniej na jedno z następujących Pytań:

- 1) Pierwszy podręcznik języka esperanto ukazał się w roku: a) 1859, b) 1887, czy c) 1917?
- 2) Twórcą języka esperanto był: a) Boudouin de Courtenay, b) Otto Jespersen, czy c) Ludwik Zamenhof?
- 3) Który z wymienionych utworów polskiej literatury klasycznej przetłumaczono na język esperanto: a) „Lalka” B. Prusa, b) „Pana Tadeusza” A. Mickiewicza, czy c) „Potop” H. Sienkiewicza?

Odpowiedzi (wyłącznie na kartkach pocztowych) należy nadsyłać w terminie do dnia 25 kwietnia br. pod adresem: Polski Związek Esperantystów, Quiz dla wszystkich, ul. Jasná 6, 00-013 Warszawa. O wynikach losowania nagród organizatorzy quizu powiadomią wszystkich uczestników piśmie.